

Esperanto en Danio

**13-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto
2006**



La kongresejo en Florenco

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Jytte Sunekær

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40 eed@esperanto.dk

Presado:

Kjeld Steffensen, Malmö

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58. ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la
fonto.**

**Limdato por la venonta numero:
01.11.2006**

Enhavo

Lande

Subtenu Esperanto-Domon senpene!.....	3
Jubileo en Malmö.....	3
Ĝenerala Kunveno de DEA 2006.....	6
Rotaria Mondkongreso en Kopenhago.....	9
La Esperanto-ekzamenoj en 2006.....	10

Loke

Kopenhago.....	12
Århus.....	14
Næstved.....	15
Brila kaj enhavoriĉa vespero .	16

Monde

Unuafojaj kongresanoj.....	19
Jubileo en Germanio.....	22
Invito al Ukrainio.....	24
Honore al la forpasintoj.....	26
Anoncoj.....	28
Nova DVD “Esperanto elektronike”.....	28

Lande

Subtenu Esperanto-Domon senpene!



La Fonduso por Esperanto-Domo estas akceptita en la bonfara retejo www.engodsag.dk. Tio signifas ke vi povas subteni Esperanto-Domon aĉetante ĉe 350 danaj entreprenoj – *tute sen elspezoj por vi mem!* La sola kondiĉo estas ke vi havu

komputilon kun retkonekto.

Jen kiel vi faros:

- 1) Iru al www.engodsag.dk.
- 2) Klaku sur la bildo “Hent Det Gode Program” (t.e. “Alŝutu La Bonan Programon”).
- 3) Sekvu la instrukciojn de Jens Gårdbo, kiu aperas en filmeto (memoru enŝalti la sonon!).

Ĝuste nun vi ankaŭ povas gajni 5000 kronojn se vi *senpage* alŝutos la programon. Estas facile, sekure kaj anonime.

Ni dissendis ankaŭ pli detalan retleteron danlingvan pri la afero al ĉiuj DEA-membroj kun retadreso.

Jubileo en Malmö

Dum siaj du unuaj jardekoj Esperanto nur malrapide disvastiĝis, sed la unua Universala Kongreso en 1905 spronis dum la sekvaj jaroj la fondon de multaj novaj Esperanto-societoj en Eŭropo. Tio nuntempe signifas longan vicon da 100-jaraj jubileoj, kaj unu el ili estas la 100-jariĝo de la Klubo Esperantista de Malmö (KEM) kaj de la tutlanda Sveda Esperanto-

Federacio (SEF). Ilin celebris la jarkongreso de la svedaj esperantistoj, okazigita en la urbo Malmö inter la 25-a kaj 28-a de majo 2006. La kadroj estis sufiĉe modestaj, tamen la etoso estis tre bona.

Kadre de la kongreso jarkunvenis ne nur SEF, sed ankaŭ Dana Esperanto-Asocio (vidu la protokolon en aparta artikolo),

SEJU kaj DEJO (la landaj junularaj organizoj) kaj la du landaj sekcioj de ILEI (Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj). La kongreson partoprenis ĉirkaŭ 80 homoj el Svedio, 30 el Danio kaj deko el aliaj landoj.

Okazis ekskurso (rondiro sur la kanaloj – Malmö estas vere bela de tie), kaj la lastan tagon estis eblo turismi en Kopenhago. La raportoj en lokaj amaskomunikiloj estis nemultaj, sed kvalitaj.

La bonan etoson prizorgis nelaste la juna muzikista grupo La Perdita Generacio kaj la prelegoj de Seán Ó Riain kaj Povilas Jegorovas – krom Georgo Handzlik, kiu kanzone distris dum unu vespero kaj faris prelegon la postan tagon.



El la inaŭguro: parolas Sten Svenonius, prezidanto de KEM

La inaŭguro okazis en aŭlo kiu facile enhavus kongresanaron duoble grandan. Tio tamen ne ŝajnis ĝeni la invititan vicurbestrinon de

Malmö, Lena Jarnbring Lindholm, kiu sufiĉe longe parolis, interpretate de Ann Louise Åkerholm. La regiona konscio en Skanio evidente estas forta; la vicurbestrino parolis longe pri la dana pasinteco de Malmö, kaj pri ĝia estonteco, sed praktike neniom pri ĝia historio kiel sveda urbo!

Post la vicurbestrino mallonge parolis la prezidanto de SEF, Bengt Olof Åradsson, pri la neceso transformiĝi kun la tempo kaj nia kapablo tion fari. Sekve eksprezidanto de SEF kaj honora membro de UEA Roland Lindblom rakontis pri la sveda Esperanto-historio. Poste la prezidantino de DEA, Ileana Schrøder, invitis al kongreso en Danio en 2008, kiam DEA kaj la Kopenhaga klubo havos sian centjaran jubileon.

Post tio oni iris al diversaj mallongaj salutoj, kiuj konsistis precipe el librodonado de Povilas Jegorovas al ĉiu ĉeestanta gravulo, kaj de Bent Jensenius el la Kultura Esperanto-Grupo en Kopenhago al la prezidantoj de SEF kaj KEM.

Post paŭzo, kun refreŝigaĵoj pagitaj de la urbo, festprelegis Seán Ó Riain, irlanda diplomato kiu plenumas la pozitivajn

antaŭjuĝojn pri irlandanoj kiel bonhumoraj kaj pri diplomatoj kiel spritaj. Lia temo estis “Lingva egalrajteco kaj diverseco en Eŭropo”, kaj kvankam la temo ja estas bone konata al esperantistoj, li facile tenis la intereson de la aŭskultantoj. Notinde eble estas ke li vidas gravan simbolan rolon por Esperanto en EU. La prelego de Georgo Handzlik la postan tagon havis similan temon. Kvankam ĝi estis malpli sprita ol tiu de Ó Riain, kaj apenaŭ enhavis ion novan por malnova aktivulo, ĝi donis bonan superrigardon pri la lingva problemo en EU laŭ tipa esperantista kaj informita vidpunkto.

Povas esti sufiĉe interese kompari najbarlandajn Esperantomovadojn. Ekzemple SEA estas multe pli riĉa kaj multe malpli kverelema ol DEA. Malgraŭ tio, mi aŭdis plurajn svedajn esperantistojn laŭdegi la dinamikecon kaj demokratiecon de la dana

asocio, kaj tio ne ŝajnas esti nura esprimo de skania regionismo. La svedaj esperantistoj havas proprajn kunvenejojn en Stokholmo, Gotenburgo kaj Malmö – ni en Danio ankoraŭ nur esperas tion. Aliflanke SEF ŝajne okazigas almenaŭ parton de sia jara membrokunveno en la sveda, dum tio en DEA de jardekoj okazas plene en Esperanto.

“Ni bezonas niajn revojn” kantas La Perdita Generacio, kaj laŭ mi tio trafas ion esencan. Vere ja estas ke la plej interesaj kaj perspektivaj aferoj ŝajnas okazi en la riska zono ekster la organizoj. Ekzemple la multegaj libroj en kaj pri Esperanto aperintaj lastatempe en Litovio estas eldonitaj ne de Litova Esperanto-Asocio mem, sed de renoma nacia eldonejo. Tamen ni bezonas ankaŭ fortajn organizojn; se ili ne ekzistas, ja nenio povas okazi ekster ili, ĉu ne?

JSL

Ĝenerala Kunveno de DEA 2006

Protokolo

1. Kiel *kunvena gvidanto* estis elektita Lars Kromann Jensen.
 2. Kiel *protokolanto* estis elektita Jens S. Larsen.
 3. *Jara raporto*.
- La prezidanto voĉlegis la tutlandan parton de la raporto.

E. Henning Olsen riproĉis la decidon de la EeD-redaktoro miksi la gazet-eltondaĵojn raportitajn de Grethe Nielsen kun tiuj trovitaj per Infomedia. Søren Willemoes petis ke oni surretigu version de EeD legeblan de blinduloj (ekzemple en la formato Word).

Kim Henriksen demandis pri la kunlaboro inter la estraranoj. Oni informis ke la estraro renkontiĝas ĉ. unufoje monate; Ejnar Hjorth, la sola estrarano de ekster Kopenhago, telefone diskutas kun la prezidanto antaŭ ĉiu kunsido. Estrarano Jytte Sunekær esprimis la opinion ke la nuna estraro ne funkcias tiel demokrate kiel povus esti. Estrara anstataŭanto Ana Røssum replikis, ke ĉiam la plimulto konsentas.

Kim Henriksen demandis ankaŭ pri la gimnazia kampanjo de DEJO. La kasisto respondis ke ĝi estis pagita de la Noll-fonduso, kaj pri la rezulto la prezidanto de DEJO Rasmus Høytrup Jensen raportis ke DEJO gajnis nemulte da membroj, sed multe da spertoj, kaj konigis Esperanton al multaj.

La jarraporto estis unuanime akceptita.

4. *Jara kalkulaĵo de 2005.*

La kasisto prezentis la ekonomion, kiu dum 2005 estis bonega pro donacoj (unuavice la 50 000-krona de honora membro Ingrid Signore). Jonas Dalmoose demandis kiajn vojaĝojn subvencias la fonduso de Noll. La estraro respondis ke temas unuavice pri edukaj vojaĝoj, ekzemple al la pedagogia trejnseminario fine de januaro/komence de februaro.

La jara kalkulaĵo estis unuanime akceptita.

5. Laborplano de DEA 2006-2007.

La prezidanto prezentis la planojn de DEA pri la landa informado, instruado kaj aplikado de Esperanto. Oni plu videbligis Esperanton per partopreno en foiroj kien iras amaso da homoj en eduka humoro, tamen BogForum estas tiel multekosta ke kredeble DEA havos budon tie por la lasta fojo en 2006. Multe mankas al ni dana-Esperanta vortaro, kaj 10-persona laborgrupo nun komencis la verkadon, ĉar evidente estas tro granda laboro por unu persono. Nova alloga instruilo estas la DVD Gerda malaperis. Fine la prezidanto akcentis ke la apogo de ĉiu unuopa membreco estas treege grava por ni – ni dependas de la sukcesoj de ĉiuj.

Kim Henriksen sugestis publikigadi la tekston de la laborplano kune kun tiu de la jarraporto. La laborplano estis akceptita.

6. *Envenintaj proponoj de KEK.*

(a) Kim Henriksen prezentis proponon malaltigi al 90 kronoj la sumon kiun ĉiu loka klubo pagas por ĉiu sia membro al la komuna kaso de DEA. Laŭ li, la kluboj bezonas la monon por la loke realigitaj ideoj, kaj pasintjare la kotizo de individuaj membroj estis malaltigita.

Kontraŭ la propono, E. Henning Olsen argumentis ke la lokaj kluboj povas simple plialtigi la – nuntempe tre malaltan – kotizon per la sama sumo, kiel oni faris en Næstved. Krome li opiniis ke iuj lokaj iniciatoj, ekzemple reprezentigo en la kopenhaga pentekosta karnavalo, estas tiel ampleksaj ke indus ke la DEA-estraro traktu ilin. Jonas Dalmose deklaris ke li volonte subtenus DEAn per 200 kronoj jare nur por ricevi EeD, kaj opiniis ke monpetado por unuopaj konkretaj projektoj kondukos al pli da trarivebleco. Kirsten-Tove Thurø informis ke ekzistas asocioj kies kotizo estas libervola, sed kiuj tamen multe enspezas. Karen Olsen kaj Kim Henriksen sugestis ke DEA faradu buĝeton.

La prezidanto konstatis ke tio estas du kontraŭaj sugestoj: Oni ne povas buĝeti, se oni ne scias kiom la membraro minimume kotizos. Ŝi ĉiujare sendas personan leteron al la individuaj membroj de DEA por memori ke denove estas tempo pagi jaran kotizon. La agado en la ĉefurbo jam fartas relative bone, nun estas tempo plivastigi ĝin, ekzemple per ĉeesto en foiroj ekster Kopenhago, kie en kelkaj kluboj tute mankas junuloj. Fine, ŝi esprimis aprobon al la kotiz-plialtigo en Næstved.

La propono de KEK estis malakceptita per 16 voĉoj kontraŭ, 3 por kaj 3 sindetenoj.

(b) Kim Henriksen prezentis proponon membrigi la lokajn membrojn de DEJO en KEK, argumentante ke kvankam la gejunuloj estas bonvenaj en la kluboj, ili tamen ne multe venas tie. Li opiniis ke la propono povos konduki al pli da dinamiko kaj intergeneracia dialogo.

DEJO-prezidanto Rasmus Høyrup Jensen opiniis ke temas pri praktika, ne formala problemo, solvebla per dialogo inter KEK kaj DEJO. Ileana Schrøder atentigis ke la DEJO-kotizo jam estas tre malalta; la 65 kronoj eĉ ne kovras la kostojn de EeD. Dum Kim Henriksen opiniis ke ni ‘perdos la junulojn’ se ili ne integriĝos en la kluboj, Ileana Schrøder male opiniis ke tio okazos se ili ne havos propran forumon en DEJO. Laŭ Jonas Dalmose, ni devas havi revojn kaj komuniki ilin unu al la alia – tiam venos la mono kaj la solvoj.

La propono estis malakceptita per 15 voĉoj kontraŭ, 4 por kaj 3 sindetenoj.

7. Elekto de prezidanto: Ileana Schrøder estis aklande reelektita.

8. Elekto de 2 estraranoj: Ejnar Hjorth kaj Bent Jensenius estis reelektitaj.

9. Elekto de 2 anstataŭantoj: Ana Røssum kaj Stanisław Mielczarek estis reelektitaj.

10. Elekto de 2 revizoroj: La prezidanto proponis Lars Kromann Jensen kaj Tara Gregers, kaj ili estis elektitaj.

11. Ĝenerala kunveno 2007: La prezidanto informis ke ĝi okazos 21-22an de aprilo venontjare, en "Brogården" en Strib ĉe la ponto sur Lillebælt.

12. Eventualaĵoj: Karen Olsen atentigis ke post la 1-a de septembro KEK kaj DEFA-Kopenhago ne plu havos sian nunan kunvenejon, kaj evoluiĝis el tio diskuto pri la Fonduso por Esperanto-Domo. La prezidanto informis ke la Fondusa estraro kunsidos meze de junio por diskuti la eblecon lupreni kunvenĉambron; la kapitalo mem estas netuŝbligita por sekurigi ke ĝi restos uzebla por aĉeti lokon. La prezidanto ankaŭ petis pluajn kontribuojn tiel ke ni konservos la rajton depreni la sumon el la imposto; oni ankaŭ povas iri al la retloko engodsag.dk, kie nombro da vendistoj promesas plupagi parton de la aĉetsumo al bonfara organizo laŭ elekto de la aĉetanto.

Rotaria Mondkongreso en Kopenhago

De la 11-a ĝis la 14-a de junio okazis la Rotaria mondkongreso en Kopenhago. RADE, la Rotaria Amikaro de Esperanto, starigis informstandon kie la konata geedza paro Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia de Bona espero deĵoris ĉiutage, ĉar ili estas membroj de RADE. Bedaŭrinde ili ne ricevis permeson por ke danaj esperantistoj povu helpi ilin deĵori. Ĉar laŭ nova strikta regulo neniu rajtis eniri la kongreson, eĉ ne kiel

gasto, sen formala aliĝo kiu estas ege multekosta.

Ni petis de Ursula informojn pri ilia deĵoro ĉe la stando kaj ŝi raportis jene:

Ni Esperanto-parolantoj estas oficiale rekonitaj. Multaj rotarianoj inter la 14.700 partoprenantoj montris intereson en nia propono solvi la lingvan problemon. Multaj petis adresojn de Esperanto-kursoj en la reto por studi hejme kaj poste

skribi al la ĝenerala sekretario de RADE-Rotary, Giuseppe, por aliĝi. Ni kolektis pliajn novajn aliĝojn de rotarianoj al RADE.

Resume estas utila al nia movado partopreni sisteme internaciajn kongresojn de ne-esperantistaj organizaĵoj por montri nian "varon", kiun multaj ne konas. Preskaŭ neniu, fakte ni eĉ ne memoras unu personon, kiu estis kontraŭ niaj tezoj pri lingvaj kaj kulturaj rajtoj, kaj tio estas bonega komenco por nia sobra kaj serioza prestiĝo, ege



necesa kiam esperantistoj iom fanatikaj volas perforte konvinki homojn partopreni kursojn, kiam ili tute ne intencas fari tion. Ni opinias, ke en la nuna historia momento de la angla dominanta lingvo, ni devas tre saĝe defendi niajn tezojn.

RADE estis fondita en 1928 de grupo da britaj kaj francaj rotarianoj. Rotario mem estas bonfara organizaĵo fondita en 1905 en Usono. Ĝi kunlaboras kun MOS por ekstermi gravajn malsanojn, sed ankaŭ subtenas ekzemple la Esperanto-lernejon Bona Espero en Brazilo.

La Esperanto-ekzamenoj en 2006

Al la ĉi-jaraj Esperanto-ekzamenoj en Kopenhago, aranĝitaj de la "Dana Esperanto-Ekzamena Komisiono" (DEEK), aliĝis al la unuagrada ekzameno 4 kandidatoj, el kiuj ĉiuj kvar sukcese trapasis la Antaŭkondiĉan Gramatikan Teston. Nur 3 el ili plenumis kaj la skriban kaj la parolan partojn de la ekzameno. Ili ricevis sian diplomon la 12-an de junio dum la klub-vespero de DEFA/KEK.

La ekzamenoj pasis glate kaj en agrabla atmosfero, nur komence de la skriba parto ekestis iom da disharmonio. Unu el la kandidatoj sentis sin tre embarasita. Ŝi ne imagis al si la ekzamenan situacion, kvankam ĝi estas detale priskribita en la regularo pri Esperanto-ekzamenoj. Ŝi forlasis la ĉambron, plorante kaj iom trompите. Ni – la aliaj – nur kun bedaŭro povis lasi ŝin foriri, sed mi decidis poste averti venontajn kandidatojn kontraŭ simila situacio. Pro tio mi skribas tiun ĉi artikoleon.

Unue mi emfazis la fakton, ke estas treege grave, ke la kandidato trastudu – ne nur legu – "Vedtægter og regulativer angående Den Danske Esperanto-Eksamenskommision og vedrørende afholdelse af esperanto-eksamen i Danmark". En ĝi vi povas legi ĉion kaj pri DEEK kaj pri la ekzamenoj. Se nia

embarasita kandidato estus studinta sian ekzempleron, ŝi antaŭscius kio ŝin atendas. La Plenumkomitato DEEK ne respondecas pri la pretigo de la kandidatoj, nur pri la taŭgeco de taskoj kaj pri la preciza disvolvo de la ekzamenoj. La kandidatoj, kiuj preparas sin en grupo, povus diskuti kun sia gvidanto aŭ kun la ceteraj grupanoj – grupoj kaj unuopuloj povas ĉiam mendi kopiojn de malnovaj taskoj de DEEK

Per tio mi venos al mia dua punkto: Kial entute plenumi Esperanto-ekzamenojn? Ĉu ili donas iun ajn prestiĝon, kompetentecon? Verŝajne ne, eble iomete da prestiĝo, iom da kontenteco, sed kial do? Tute same kiel la lernado de la lingvo mem: Ankaŭ ĝin ni ja lernis/studis por riĉigi kaj plezurigi nin mem. Nur tiuj, kiuj posedas la lingvon, konas ĝian valoron; scias pri la riĉa mondo, kiun ĝi malfermas. Ju pli bone ni scias la lingvon, des pli ĝi multe donas al ni. La ĉefa signifo de la Esperanto-ekzamenoj konsistas ĝuste en tio, ke pere de ili oni povas starigi al si celojn por la studado. Esperanto ja estas formo de paradokso. Ĝi estas la plej facile lernebla lingvo, facile uzebla kaj facile komprenebla, samtempe nur per penado kaj daŭra studado oni finlernas ĝin. Estas ĝojige vidi, kiom da studgrupoj ekkreskis en la kluboj de KEK/DEFA.

Nia revo en DEEK estas tio, ke jam komence de la dua sezono la grupgvidanto preparolos la ekzamenojn, prezentos la postulojn al la unuagrada ekzameno kaj pridiskutos la celojn, kiuj estos adekvataj por ĝuste tiu grupo. Ne gravas, ĉu grupo bezonas plurajn sezonojn por atingi la rezulton, nur gravas ke oni starigu la sezonajn celojn kaj diligente laboru por atingi ilin. La gvidanto neniam hezitu mendi provkopiojn de malnovaj taskoj (vidu la adreson en la adresaro sendita kun ĉi tiu numero de Esperanto en Danio, *red.*).

Ankaŭ la gvidanto de la progresintoj diskutu la broŝureton de DEEK kun la partoprenantoj, por ke ili kune elektu la studmaterialon laŭ la duogradaj postuloj. Verŝajne ankaŭ ili bezonus plurajn sezonojn, ĉar la postuloj estas pli ampleksaj. Ĉiam gravas labori celkonscie, ĉu temas pri bona gramatiko, pri la historio de Esperanto, ĉu pri legado de klasikaj aŭ modernaj verkoj. Ĉiuokaze oni pere de la studado plibonigas sian scion, sian lingvokapablon kaj sian memfidon, kaj sekve de tio la Esperanto-vivon en la kluboj.

Per tio ĉi ni deziras al vi ĉiuj bonan novan sezonon en la novaj lokaloj.

Lis Thune, Prezidanto de DEEK

Loke

Kopenhago

**Ekde la 1-a de septembro KEK kaj DEFA Kopenhago
kunvenos en nova ejo:**

Kalvebod Brygge 32, 1560 København V

Aŭtomobiloj uzu la deklivon al la surtegmenta parkumejo,
piedirantoj uzu la ŝtuparon indikitan kiel 'Trappetårn 32'. La pordo
'Reception' (akceptejo) estas tuj, kie oni alvenas.

Kursoj kaj legogrupo: Ĉiulunde ekde 18:45h.

Programo: 19:30–20:15 + 20:45–21:30. Paŭzo kun ebleco aĉeti
kafon/teon kaj bieron/akvon 20:15–20:45. Ne estas permesite mem
kunporti trinkaĵojn!

Kontaktulo: Lene Niemann, Hovedvagsstræde 9 E, 1, DK-3000
Helsingør, tel 49 26 13 19, retadreso niemann@kabelmail.dk

La **Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo** (KEKG) denove invitas
vin al aŭtunaj prelegoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, salono n-
ro 1, 2a etaĝo, unufoje monate dum la vintra sezono je 19:30h.

Enirprezo po 10 kr kaj kafo/teo + kuko je po 10 kr.

Kontaktulo: Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, 2720 Vanløse,
tel 38 74 97 64, retadreso kulturgrupo@webspeed.dk.

Kursoj okazos en Den Classenske Legatskole, Vester Voldgade 98,
ĉiuĵaŭde (escepte de lernejoj ferioj) ekde 18:45h, ĉambroj 17 + 18, 2a
etaĝo, je la datoj 05.10., 12.10., 26.10., 02.11., 09.11., 16.11., 23.11., 30.11.,
07.12. kaj 14.12.

Kontaktulo: Kim J Henriksen, Hallandsgade 6, 4, 2300 København S,
tel 32 54 93 54, retadreso kek@esperanto.dk

Aliaj **kursoj** okazos en Esperantoskolen, Ny Kongensgade 21, 1-a etaĝo, je 15:00h. Kontaktulo: Ole Blaust, Ny Kongensgade 18, 1557 K benhavn V, tel 33 33 90 30, retadreso zita@esperantoskolen.dk

Intensiva unumonata kurso komenciĝos lunde la 11-an de septembro. Instruado okazos ĉiujn labortagojn de la semajno dum la periodo 11.09. – 06.10. je h 18:15–20:15.

Krome okazos sabataj posttagmezaj kunvenoj:

Sa 28.10: Ludoj per esperantaj ludiloj.

Sa 11.11: Traduko de turismaj informoj pri Kopenhago.

Sa 09.12: Julfesto, danlingva, kune kun najbaroj.

Okazos

(Adreso ĉe DEFA/KEK kie ne estas indikita KEKG aŭ alio)

Lu 04.09: La unua prelego en serio de ses kun titolo ‘La origino de ĉio’: Rut Jesus prelegos pri *La origino de la universo*.

Lu 11.09: Mogens Rude Andersen distros kaj laborigos nin per tasko: Serpentuma krucvortenigmo pri esperantaj verkoj.

Ve 15.09 (KEKG) Torben Svendsen prelegos pri *C.M. Bellmann – mozaikoj el la multfaceta vivo de la fama sveda kanzonisto*.

Sa 16.09, 12-18h: Internacia Tago de Kopenhago.
Ĉe Peblinge Dosseringen/Dronning Louises
Bro. KEK havos budon kaj partoprenos la
distradon kun muziko sur scenejo.

Lu 18.09: Legogrupa + Somerstudado – ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj.

Sa 23.09, 11-17h: KEK aranĝas kune kun Verdensklubben kaj studentoj la unuan lingvofestivalon en Danio.
Ĝi okazos en K benhavns Universitet Amager (KUA) Njalsgade 80 en la eksmanĝejo (“gamle danskantane”) dekstre de la ĉefenirejo. 20-30 lingvoj sin prezentos ĉe budoj kaj dum duonhoraj prezentadoj en apudaj ĉambroj. Sur scenejo estos kultura distrado en la diversaj lingvoj.

Lu 25.09: Legogrupa + La dua prelego en la serio ‘La origino de ĉio’: Rut Jesus prelegos pri *La origino de la sunsistemo*.

Lu 09.10: Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi.

Me 11.10 (KEKG) Rut Jesus kaj Jens S.Larsen prelegos pri *La origino de la vivo* – la tria prelego en la serio pri ‘La origino de ĉio’.

Ve 13.10, 18-24h: Kultura Nokto en Kopenhago, en du lokoj:
Ekspozicioj Medborgerhus Indre By, Ahlefeldtsgade 33
kaj en
Vesterbro Bibliotek, Lyrskovgade 4. Esperanto de Luxe
muzikos inter 20.15-21.00h en Lyrskovgade.

Lu 23.10: La kvara prelego en la serio ‘La origino de ĉio’: Jens S.Larsen prelegos pri *La origino de la homo*.

Lu 06.11: Kantvespero, dum kiu ni kantu konatajn kaj ne konatajn kantojn, krome ni ludos.

Me 08.11 (KEKG) Jens S.Larsen prelegos pri *La origino de kulturo kaj civilizo* – la kvina prelego en la serio ‘La origino de ĉio’.

17. – 19. de novembro: BogForum 2006.
DEA ripetos la sukceson de 2005 –
eĉ en la sama stando 402!

Lu 20.11: La sesa kaj lasta prelego en la serio ‘La origino de ĉio’:
Jens S.Larsen prelegos pri *La origino de la lingvo*.

Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310 Tranbjerg J. – Tel./fakso: 86 29 23 06. Retpoŝto: stanislaw@ofir.dk.

Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.

Kunvenoj: lasta (*kun esceptoj*) ĵaŭdo de ĉiu monato je la 19:30 h.

Post varmega somero ni denove ekaktivis en Esperanto-kluboj. Ni esperu, ke ĉiuj membroj estos iom pli aktivaj en la venonta sezono kaj ankaŭ kurso-grupo sub la gvido de Søren Dalmose kunvenos regule por perfektigadi sian Esperanto-scipovon.

Okazos

28.09: “Mia somerferio” – ĉiu el ni rakontu pri sia somerferio.

Inter la 29. de septembro kaj la 1. de oktobro okazos la sanfoiro “Krop-Sind-Ånd” en la Marselisborg-halo.
Ni partoprenos en stando n-ro 44.

26.10: Video-vespero.

30.11: Jonas Dalmose konigos nin kun Martinus-simboloj.

14.12: Zamenhof- kaj Kristnaskofesto.

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tlf 5572 1240,
rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk

Okazos

La aŭtuna/vintra sezono komenciĝos vendrede la 15-an de septembro, kaj daŭre ni kunvenos certajn vendredojn.

La provizora plano estas:

Danlingvaj prelegoj, kiujn ni reklamas en la lokaj amasmedioj, okazos 06.10., 03.11., 01.12., 12.01., 02.02., 02.03. Temoj ankoraŭ ne fintraktitaj.

Ordinaraj kunvenoj okazos:

15.09., 29.09., 13.10., 27.10., 10.11., 24.11., 08.12., 05.01., 26.01., 09.02., 23.02., 09.03., 23.03., 30.03. kun enhavo: Trakto de lingvaj aferoj – laŭ ankoraŭ ne fiksita plano. NB. La novembraj, decembra, januaraj kaj februaraj ordinaraj kunvenoj okazos posttagmeze!

Okazis

Sabate la 1-an de julio ni okazigis nian kutiman someran ekskurson. En tri privataj aŭtomobiloj 11 personoj, inter ili po unu gasto de Odense kaj Kopenhago, en la perfekte bela somera vetero veturis norden al Reersø, kie ni ĝuis la vilaĝan idilion dum mallonga vizito. De tie ni iris al la nova hejmo de Anna kaj Erik Hansen en Høng. Ili regalis nin per ege bongusta kaj iom ekzotika manĝaĵo, kaj tie ni travivis agrablan etoson. Eĉ ni ricevis belan ŝildon, kiun ni pludonis al DEA, kiu verŝajne utiligos ĝin en diversaj

kopenhagaj ekspozicioj. Sataj ni pluiris al *Kunstnergaarden* apud Dianalund. Tie renkontis nin ĉiĉerono, kiu en ekstreme verva maniero montris kaj prikomentis la riĉegan kolekton de artaĵoj, faritan de la nun forpasinta posedanto Lars Saltofte Larsen (1916-1999). Ho, kiom ideriĉa kaj inventema li estis. La rezulto estas skulptaĵoj, pentraĵoj, mozaikaĵoj, lignotranĉaĵoj, kiuj ampleksas areon de 700 m².

Post tiu vizito ni reiris hejmen, kontentaj fizike kaj spirite.

eho

Brila kaj enhavoriĉa vespero

La 19-an de junio 2006 la kopenhagaj kluboj DEFA kaj KEK okazigis brilan vesperon kun la geedza paro Zofia Banet-Fornalowa kaj Jerzy Fornal.

Zofia Banet-Fornalowa

estas historiisto kaj verkis multajn librojn pri la Esperanto-historio kaj pri la Esperanto-teatro.

Ĉi-foje Zofia Banet-Fornalowa forte emfazis la devon kaj la respondecon de la historiistoj profunde studi la fontojn, antaŭ ol ili publikigas historiajn tekstojn. Multaj el la nuna aŭtoroj, kiuj nomas sin historiistoj, nur facilanime disvastigas nedokumentitajn asertojn, kiuj svarmas en la Esperanto-Movado, ekzemple la “malkovroj” de Zbigniew Romaniuk en pollingva almanako “*Studia Podlaskie*”, en volumoj de 2002 kaj 2004, “ofendoj kaj tute ne pravigitaj asertoj, kontraŭ L.L. Zamenhof, lia patro Markus Zamenhof, alia membro de la familio kaj pli vaste kontraŭ la Esperanto-Movado”...

Per ampleksa artikolo en la sama almanako, vol. XV, 2005, Zofia Banet-Fornalowa refutis la senbazajn misfamigojn pri D-ro Zamenhof kaj ties familio.

Zofia Banet-Fornalowa akcentis, ke hodiaŭ estas tre malfacile trovi fidindajn fontojn pro diversaj kaŭzoj. La plej ampleksaj fontoj estas la verkoj de D-ro L.L. Zamenhof mem, la verkoj de Prof. D-ro Ivo Lapenna: “*Esperanto en Perspektivo*”, 1974, “*Centro de Esploro kaj Dokumentado*” (la origina CED, ĝis 1974), “*Hamburgo en Retrospektivo*”, 1977; la Halina-dokumento (kolekto de atestiloj pri L.L. Zamenhof de naskiĝo ĝis morto, eldonita de Ludovikito); monografioj kaj biografioj de diversaj Esperanto-aktivuloj.

Mankas sistema daŭrigo de entreprenitaj taskoj, ekzemple CED (depost 1974); bindita revuaro kaj aliaj gravaj fontoj.

Per siaj seriozaj historiaj studoj Zofia Banet-Fornalowa klopodas krei

fidindajn fontojn por la estontaj generacioj. Laste ŝi trovis la tomboŝtonon de la bopatro de L.L. Zamenhof, Aleksander Sender Silbernik (30.01.1832 – 25.03.1906), kiu grandanime apogis kaj subtenis sian genian bofilon. Sur la tomboŝtono estas skribite, tradukita el la hebrea: “Ĉi tie ripozas / viro honesta / en siaj pensoj kaj agoj / Aleksander Sender / Silbernik / el urbo Kaunas / filo de granda rabeno Jehuda Leib / el urbo Vieškňiai (distrikto Kaunas) / naskita 28 szwat (5)502 / mortis 28 adar (5)662.”

La vigla kaj riĉenhava prelego de Zofia Banet-Fornalowa estis akceptita per varma aplaŭdo.

Jerzy Fornal

dramaktoro de la *Nacia Teatro* en Varsovio. Krome, li havas sian propran Esperanto-Teatron *Espero*. Ĝis nun li prezentis 11 spektaklojn en Esperanto en Pollando kaj ankaŭ en Argentino, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Danio, Francio, Germanio, Litovio, Nederlando, Svedio k.a.

Okaze de la Mozart-Jaro, Jerzy Fornal prezentis la dramon “Wolf-gangerl” – monodramo pri la drama vivo de Wolfgang Amadeus Mozart – de Gunnar Gällmo.

Mi spertis tiun fascinantan teatraĵon la unuan fojon en 1990 en la

Londona Esperanto-Klubo, kiam mi loĝis tie, sed mi ne povas ne akcenti, ke ĉi-foje Jerzy Fornal superis sin mem. Ni estis multaj, kiuj estis ravitaj pro lia eksterordinare brila prezento. Tion montris ankaŭ la grandega aplaŭdo post lia prezento.

Aŭskultante la unikan muzikon de Mozart kaj rigardante Jerzy Fornal mi sentis kaj imagis, ke li **estas** Mozart, kaj ke en mia fantazio ni troviĝas en la tempo de Mozart. Jerzy Fornal mem estas senfine sentema kaj muzikema homo. Ĉiuj liaj graciaj movoj estas unikaj, kaj la kostumo perfekta.

La Esperanto-Movado – al kiu mankas veraj profesiuloj en ĉiuj branĉoj – devus esti feliĉa havi en sia mezo kelkajn efektivajn profesiulojn. Ĝi devus pli profiti de tiu tre profesia kaj tre talenta aktoro kiel Jerzy Fornal!

Konklude.

Mi apelacias al la tuta Esperanto-Movado multe pli utiligi Zofia Banet-Fornalowa kiel historiiston anstataŭ uzi tiujn, kiujn oni nun nomas historiistoj, kvankam ili ne sufiĉe serioze studas la fontojn, kaj tial ne povas objekte kaj sincere raporti pri la pasinteco. Same oni utiligu Jerzy Fornal kiel profesia aktoro, ĉar ambaŭ levas la nivelon de la Esperanto-kulturo.

Birthe Lapenna

Unuafojaj kongresanoj

Birgit Andersen kaj mi partoprenis en la 91a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco, de la 29 julio – 5 aŭgusto 2006. Estis nia unua fojo.

Ni alteriĝis en tre varma sunbrilo kaj ĝi kontinuus dum la tuta kongreso. Ni spertis nur iomete da pluvo kaj tondro. Bela sed tre varma vetero.

Konatiĝi kun la sistemo

La unuan tagon ni registrigis nin en la kelo de la kongresejo. La kela ĉambro havis tre belajn bildojn (montris la urbon Florenco) sur la muroj. Dum la kunveno por unuafojaj kongresanoj la konstanta kongresa sekretario (bedaŭrinde ne Corsetti) bonvenigis nin. Li kondukis nin tra la kongresa libro. Estis bone, ĉar ni ne konis ĉiujn mal-longigojn kaj nomojn uzatajn en la programa kradaĵo.

Ni ankaŭ piediris inter la budoj dum la Interkona Vespero. Estis multaj budoj el diversaj asocioj. Ni ricevis plurajn broŝurojn... Ni interalie parolis kun virino el la

Esperanto-Urbo, Herzberg, en Germanio.

La sekvajn tagojn ni aŭskultis prelegojn kaj koncertojn, ekskursis ktp. Ni ankaŭ havis tempon por promeni tra la urbo, viziti bazarojn, diversajn preĝejojn, muzeojn kaj memkompreneble manĝi!

Fake

La plej interesaj “fakaĵoj” estis aŭskulti pri la laboro de la Akademio de Esperanto kaj de la UEA-estraro, vidi la UEA-Komitaton laboranta, la prezentado de la novaj libroj (eldonitaj 2006), kaj pri Esperanto en universitatoj.

Lunde ni aŭskultis dum 5 horoj pri renesanco. La prelegantoj komencis kun la lingvo Latina, rakontis pri la renesanco en Italio (montris pentraĵojn, skulptaĵojn ktp.) kaj pri ĝia influo dum la sekvaj jarcentoj en Anglio kaj Nederlando. Ili priskribis la periodon tiel vive ke ni preskaŭ “vidis” la renesancon.

Vendrede la prelego pri Zamenhof kaj la Dua UK en Ĝenevo estis intereseĝa. La preleganto rakontis pri la teorio de Zamenhof, hilelismo/homaranismo.

Kelkfoje ni ĉeestis koncertojn, precipe la tre bonan pianokonzerton kun Andreo Korobejnikov el Rusio.

Aŭkcio kun Humphrey Tonkin – mi aĉetis libron pri Roza Luksemburg por EUR 25. Libro, kiun angla verkistino skribis en Esperanto en 1918 estis vendita por EUR 125!

Ni ĉeestis la konzerton de Solo. Li certe estas frenezulo, sed ni trovis lin tre amuza, ankaŭ La Esperon laŭ flamenka stilo.

En la urbo ni spektis folklorajn flagsvingistojn kun vestoj de la 15-a jarcento.

Birgit ĉeestis konzerton kun Ĵomart kaj Nataŝa kun Carina. Carina havas nur 10 jarojn, sed jam kantas tre bone.

Ni ambaŭ partoprenis la bankedon. Ĉe nia tablo sidis francoj, japanoj kaj unu ruso. La manĝo estis abunda, precipe la 3 vegetaranoj ĉe nia tablo ricevis tiel multe da manĝo ke ili ne povis manĝi ĉion.

Turisme

Tara ekskursis al la Uffizi-muzeo. Ne estis tiel bone, ĉar la gvidantoj perdis la vojon kaj tro tro multe da homoj estis en la muzeo. Ni ne povis

bone vidi la pentraĵojn. Do, mi foriris kaj anstataŭe vidis la ĉambrojn de Leonardo da Vinci.

Birgit ekskursis al la Medici vilaoj. Estis tre interese.

Birgit kantis en la internacia koruso. Estis bone renkonti homojn, kiuj interesiĝis pri muziko. La koruso distris kelkfoje.

Ni vizitis la Libroservon multfoje kaj aĉetis insignojn, librojn, muzikon, poŝtkartojn sed mankis Esperantaj T-ĉemizoj, eble venontfoje? Eble UEA vendos T-ĉemizojn kun la kongresa motivo?

Sed plej bone estis paroli Esperanton kun homoj el la tuta mondo. Estis la unua fojo ke ni parolis Esperanton kun homoj, kun kiuj ni ne havis alian komunan lingvon. Ni parolis angle nur kiam ni faris aĉetojn aŭ vizitis restoraciojn por manĝi en la urbo.

Do, ni havis tre belegan viziton en Florenco – tre bela urbo – kaj bonan kongreson. Ni rekomendas viziti Florencon (krom la granda amaso da arto – skulptaĵoj, pentraĵoj ktp. – ni ankaŭ rekomendas “Vivoli” (Via Isola delle Stinche) se vi ĝuas tre bonan glaciaĵon) kaj la venontajn Universalajn Kongresojn!

Tara Gregers

Jubileo en Germanio

Dum la ĉi-jara Pentekosto, 2-5-an de junio, niaj samideanoj en Germana Esperanto-Asocio festis sian 100-jaran jubileon kadre de la 83a Germana Esperanto-Kongreso en Brunsviko (Braunschweig) en centra Germanio.

La kongreson partoprenis i.a. 19 eksterlandaj gastoj, plejparte esperantistoj de la najbaraj landoj, sed ankaŭ ges-roj Grattapaglia el Brazilio. El Danio partoprenis la prezidanto de DEA Ileana Schrøder, Jytte Sunekær kaj Arne Casper.

La Kongreso okazis en la centro de Brunsviko en la luksa hotelo Mövenpieck kaj entute 206 partoprenantoj ĉeestis.

Vendrede okazis la akcepto en la urbodomo kaj vespere la solena malfermo. Mi surpriziĝis ke en la Kongresa Libro mi ne trovis La Esperon – sed ĝi ŝajne tradicie ne estas parto de la germanaj kongresoj.

La venontan tagon ni aŭskultis la festprelegon de la konata germana verkisto Ulrich Lins pri la historio de GEA. Pro la ĉeesto de novaj germanaj esperantistoj kaj gastoj la festprelego estis en la germana lingvo, kiun domaĝe kelkaj eksterlandaj samideanoj ne povis sekvi. Posttagmeze estis ankaŭ aliaj prelegantoj, interalie la prezidanto de UEA Renato Corsetti kiu prelegis pri Esperanto en EU, prof. Bormann rakontis pri la kongreso samurbe en 1972, Detlev Blanke prelegis pri la kondiĉoj de la Esperanta movado en la iama GDR kaj el Ĉeĥio Petro Ĉrdle pri eko-turismo. Vespere okazis la festa vespermanĝo en tre varma kaj bonega etoso.

Dimanĉe estis la tago de la jarkunveno de GEA, – kiu denove okazis en la germana lingvo. Posttagmeze estis la tempo por ekskursi kaj ni vizitis Herzberg, kun la tiea Kulturcentro de Esperanto. Herzberg ŝanĝis ĵus sian nomon al Herzberg, la Esperanto-urbo.

Vespere la eksterlandaj gastoj salutis – kaj Ileana salutis kaj gratulis en la nomo de DEA.

Pro la longa hejmovojaĝo ni bedaŭrinde ne partoprenis en la lunda programo, – sed laŭ la Kongresa Libro prelegis Zlatko Tišljar el Slovenio kaj Andreas Künzli el Svislando.

A. Casper

Invito al Ukrainio

“Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej prestiĝan kuraĉlokon de Ukrainio, krimean urbon – Jaltan. Tie okazis la tradicia Esperanto-festivalo ‘Aroma Jalto’ 29.04 – 09.05.2006. La lingva reĝimo estas severa: Nulaj komencantoj ne estas akceptataj. Dum la registrado ĉiu partoprenanto memstare plenigas la aliĝilon kaj respondas simplajn demandojn.”

Mi akceptis la inviton, kaj por mi estis kaj la unua partopreno en eksterlanda aranĝo kaj la unua vojaĝo al Ukrainio. La 25-an de aprilo mi ekveturis el Kopenhago per aviadilo tra Budapeŝto al Odeso, kie mi restis dum tri tagoj. La tutan vivon mi volis viziti Odeson, ĉar en tiu ĉi urbo iam loĝis la familio de miaj patraj geavoj. Tial mi decidis resti en Odeso dum tri tagoj.

Dank’ al Boris mi konatiĝis kun S-ro Semjon Vajnblat, la prezidanto de Blanka Akacio, kiu estas unu el la Esperanto-kluboĵoj en Odeso. Dum la restado en la urbo, Semjon bonkore aranĝis la loĝadon kaj la vizitojn al la Blanka Akacio kaj al Bonfara klubo por Hebreaj pensiuloj. Plue, kiel mia ĉiĉerono en la urbo, Semjon montris al mi la plej interesajn vidindaĵojn, inkluzive la Potemkin-ŝtuparon, la Richelieu-monumenton ktp. Laŭ mi,

unu el la plej interesaj lokoj estis la Zamenhofa monumento skulptita de N.V.Blaĵkov, kiu situas en Deribasovskaja. Tiu ĉi statuo estas la sola Zamenhofa monumento en eks-Sovetio.

La 28-an de aprilo vespere mi daŭrigis la vojaĝon per nokta trajno al Simferopolo, kaj finfine mi trolebusis al Jalto kaj la kursejo. Post la registriĝo mi enloĝiĝis en ĉambro kun tri esperantistinoj el Pollando. La saman vesperon la prezidanto de la Jalta klubo Jefim Zajdman tre vigle prelegis pri la historio de Esperanto en Jalto kaj pri kelkaj gravaj Esperantistoj, kiu iam loĝis en la urbo, ekzemple Nikolao Borovko kaj Ilja Ostrovskij.

La 30-an de aprilo la aranĝo oficiale komenciĝis. Ĉi-jare ĉeestis 106 personoj kaj el ili estis 55 eksterlandanoj. Ĉiutage post la matena anonckunveno okazis la lingvaj diversgradaj kursoj: komentanta, paroliga kaj perfektiga. Pro la manko de parola praktiko, mi elektis la paroligan kurson, kies gvidantino estis Olga Gribovan. La perfektig-grupaj partoprenantoj, kies gvidantino estis Tatyana Auderskaya studis ‘Vojaĝon en Esperanto-lando’.

Ĉiutage je la 12-a okazis la 'Universitataj' prelegoj, kaj ĉiuj estis brilaj. La Prezidanto de UEA Renato Corsetti estis la unua preleganto, kaj li dufoje prelegis, unue pri 'La stato de Esperanto en la mondo' kaj due pri 'Ĉu la suno leviĝas okcidente'. La plej grava mesaĝo de la prelegoj temis pri la vigla intereso pri Esperanto en Afriko, Sudameriko kaj Azio, kontraŭ la relativa apatio en aliaj landoj. En sia prelego Paŭlo Moĵajev bone klarigis la akuzativon, kiun li opinias la plej granda peko ĉe esperantistoj. Tatjana Auderskaya interese prelegis pri la kortuŝa vivo kaj inspira agado de Vasilij Eroŝenko; mi havas kopion de tiu ĉi prelego. Florea Popa el Timiŝoara en Rumanio rakontis pri la interesa historio de la Esperanto-movado en ŝia lando. Finfine Tatjana prelegis pri biodiverseco.

Posttagmeze okazis la ekskursoj kaj la piedmarŝoj. La naturo en Krimeo estas belega sed kruda. Por la maljunularo estis granda defio partopreni la plimulton de la ekskursoj. Tamen mi vizitis la Hirundan Neston kaj la Livadian palacon, kie okazis la Jalta Kongreso fine de la 2-a Mondmilito, en 1945. Mi ankaŭ ekskursis al Baĥĉisaraj, piedmarŝis en la montaro kaj kompreneble esploris la urbon Jalto. Por la fortaj gejunuloj

estis dutaga turista marŝo al akvofalo Ĝur-Ĝur.

Ĉiuvespere okazis kulturaj eventoj: koncertoj de Paŭlo Moĵajev, Oĉjo Ĉajka kaj Pola koruso, interkona vespero, ludoj, kvizo pri Aroma Jalto, teatraĵoj kaj Esperantaj filmoj kreitaj de la Odesa junulara klubo ktp.

La lingva ordo devis esti grava afero dum tia aranĝo. Oni atendis, ke ĉiu Esperante parolis, sed ho ve, kelkfoje ŝajnis al mi, ke mi troviĝis jen en krokodilejo, jen en aligatorejo. Ĉiutage dum la matena anonckunveno oni elektis la plej krokodileman personon, kiu do surmetis ludkrokodileton ĝis la venonta anonckunveno. (Mi mem ne havis eblecon tiel peki, ĉar neniu estis el Anglio aŭ Danio!) La malpliaj krokodilemuloj ricevis monpremiojn la lastan vesperon.

La plej meritinda aspekto de tiu ĉi kurso estis la homaraj renkontoj kun Esperantistoj el aliaj landoj. Fojfoje mi spertis la ĉiutagan uzeblecon de la lingvo. Dum la restado mi Esperante parolis kun la dujara denaskula filo de Oĉjo. Iu junulo flustre konfidencis al mi, ke li volus trovi Esperantistinan edzinon. Nova amikino riproĉis al mi malfruiĝon, kaj mi pardonpetis. Mi riproĉis aliajn pro manko de ĝusta informo. Kiu povas kredi, ke Esperanto ne estas uzebla?

La edukado ne estas nur la lernado de novaj lertoj. La plimulto de la 106 personoj kiuj kunvenis en la lernejo vigle interesiĝas pri Esperanto, sed bedaŭrinde ekzistis en la partoprenantaro granda malegaleco rilate al monrimedoj kaj provizoj. Esperantistoj en la riĉa okcidentaj landoj havas tiom da eblecoj lerni kaj praktiki la lingvon. Ni ne bezonas foriri, ni havas komputilon kaj rapidan eniron al la interreto. Iu partoprenanto (Pim el Nederlando) per la efika uzado de la interreto sufiĉe bone lernis Esperanton dum tri

tagoj. La reto estas mirinda utilo, sed ĉu ni kredus, ke ties posedo signifus, ke ni posedas la solan sloŝilon al la trezorejo de Esperanta kulturo? Dum 18 monatoj mi jam sidas antaŭ la komputilo por lerni Esperanton, eĉ mi klubas ktp, mi jam komencis kredi, ke nur per la universala uzado de komputiloj sukcesos la afero. Dum la kurso mi komprenis, ke spite al la materialaj mankoj, esperantistoj en aliaj landoj multe kontribuas.

La venontan jaron okazos la 19-a Aroma Jalto. Se vi havos eblecon, kaptu la ŝancon partopreni!

Betty Chatterjee

Honore al la forpasintoj

La 30-an de januaro 2006 forpasis **Poul Thorsen**, la granda dana poeto. Li ĉiam estis helpema, multon tradukis kaj multajn librojn verkis, ekzemple *Rozoj kaj Urtikoj*, *Sen Paraŝuto* kaj *Stokita Vino* – kaj en brila lingva stilo! Nun ekzistas retpaĝo pri liaj eldonoj. Vidu: www.poulthorsen.dk.

Lars Kromann Jensen

Else Margrethe Nielsen naskita la 20-an de januaro 1909, forlasis nin matene la 27-an de junio 2006, atinginte 97 jarojn.

Else Margrethe estis mirinda homo, kiun mi ekkonis antaŭ ĉirkaŭ

7 jaroj. Vizitante ŝin en belega kaj agrabla hejmo ni multfoje admiris ŝian vivsaĝecon, internan ekvilibron kaj trankvilon, ŝian kreemecon, donacemon kaj malfermecon pri diversaj homoj kaj kulturoj. Ĉiam ŝi rakontis ion interesan pri sia vivo, interalie ke ŝi pere de Esperanto vizitis multajn landojn, prelegis pri diversaj temoj, kaj eĉ havis multajn gastojn de diversaj kulturoj tranoktantaj en ŝia hejmo. Ŝi vere donis al ni inspiron sekvi tiun belegan vivmanieron.

Else Margrethe eterne restos profunde en nia koro kaj memoro...


Helen Claesson

Anoncoj

Nova DVD “Esperanto elektronike”

Dum la Florenca UK aperis ampleksa kolekto de informoj pri Esperanto, kiun efektivigis la grupo E@I. La informoj prezentiĝas en 25 lingvoj, inkluzive la danan. La DVD enhavas interalie:

- informojn pri Esperanto;
- grandan selekton de muzikverkoj en Esperanto;
- paroladojn de elstaraj homoj en la Esperanto-historio;
- diversajn komputilajn programojn, inkluzive ludojn;
- ekzemplojn de scienca kaj beletra literaturo;
- kursojn, inkluzive videokurson;
- po du jarkolektojn de la revuoj “Esperanto” kaj “Kontakto”;
- la artikolon pri Esperanto kaj kelkajn pliajn el Vikipedio;
- diversajn grandajn kaj malgrandajn vortarojn;
- – kaj retligojn al tio kio ne povis esti sur la disko.



Estas dezirinde ke la informoj de ĉi tiu disko atingu laŭeble plej multajn personojn. Esperantistoj povas aĉeti ĝin laŭ la ridinde malalta prezo de 50 danaj kronoj ĉe la Libroservo de DEA (vidu la adresaron senditan kun ĉi tiu numero).

*El la akcepto de la
germana Esperanto-
kongreso en la urbo-
domo de Braun-
schweig.*

*La unua de maldekstre
estas la urbestro de
“Herzberg, la
Esperanto-urbo”.*



*Danaj partoprenantoj
de la 21-a Universala
Kongreso de Esperanto,
en Florenco, Italio.*

Gratulo kaj instigo al la legantoj – de la redakcio

Niaj membroj estis eksterordinare diligentaj kontribuante por ĉi tiu numero de EeD; eĉ ne restis loko por raporto de Inna Busck pri kurso en Lesjöfors, kaj estas kvazaŭ bonŝanco ke neniu el niaj talentaj junaj IJK-partoprenintoj raportis pri ĝi. Kvankam tia abundeco da materialo ege ĝojigas la redaktoron, ĝi ankaŭ kaŭzas problemojn. – La revuo gravas kiel informilo kaj lingva ekzercejo, do pravigeblas ke ĝi estas la plej peza elemento de nia buĝeto. Tamen por havi spacon por ĉiuj interesaj kontribuoj, la revuo devas havi pli da paĝoj aŭ pli da numeroj, kaj tion ni ne ricevos sen pli da donacoj, pli alta kotizo – aŭ, plej bone, pli da membroj.